
AGEI-CIRKULERO marto 2008 (n-ro 16)

Neregula informilo pri E-instruado, novaĵoj, projektoj, renkontiĝoj

- | | |
|----------------------|-------------------|
| 1. Nova statuto | 8. SUB-18 |
| 2. Membraro | 9. Lernmaterialoj |
| 3. GEK: AGEI-kunveno | 10. TOREDO-4 |
| 4. Klerigado | 11. Juna Amiko |
| 5. Sekva studsesio | 12. ILEI-novaĵoj |
| 6. Lerneja instruado | 13. Didacta-2008 |
| 7. Popolaltlernejo | 14. Urĝa alvoko |

SALUTON EN 2008!

1. NOVA STATUTO

En novembro nia asocio ricevis de la financoficejo agnoskon pri komuntileco kaj post longa proceduro ni ekhavis novan statuton. Dato de la registrado: 01.02.2008.

2. MEMBRARO

Laŭ al nuna stato AGEI havas 87 membrojn. Dankon al ĉiuj malnovaj membroj pro la pago de la ĉi-jara kotizo. Ĉu vi ankoraŭ forgesis pagi por 2008? Memoru, ke AGEI havas novan kontonumeron: Volksbank Schmalleberg, BLZ: 46062817, KNr: 5187110500
Por aliĝilo bv. kontakti nian kasiston: Christoph Krick, Gunninghauser Str. 11a, 59955 Winterberg, christof.krick@esperanto.de
Reta aliĝilo estas ĉe <http://instrureg.laarts.info/>

3. GEK: AGEI KUNVENO

La tradician jaran ĉefkunvenon de AGEI ni havos dum Germana Esperanto-Kongreso (GEK) en Essen dum Pentekosto 9-12 majo, 2008. Bonvenon. Bv. ne forgesi ĝustatempe aliĝi! GEA-komisiito pri aranĝoj
Christian Darbellay: Kaiserstr. 39, 24143 Kiel. Tel. 0431/73 77 88 Esperanto-Kiel@gmx.de
Reta aliĝilo: http://www.esperanto.de/gek/alighilo_eo.php

Jen invitilo por nia membraro:

Sehr geehrte Mitglieder,

**hiermit lade ich statutengemäß zur Mitgliederversammlung am 10.05.2008 (Samstag) 15:00 in Essen ein.
Ort der Versammlung: CVJM Essen e.V., Hindenburgstraße 57, 45127 Essen**

Vorgesehene Tagesordnung:

TOP 1: Wahl des Sitzungsleiters.

Begrüßung und Eröffnung.

Wahl des Protokollanten.

Feststellen der ordnungsgemäßen Einladung und Beschlussfähigkeit.

TOP 2: Feststellen der Tagesordnung.

TOP 3: Bericht des Vorstands. Entlastung des Vorstands.

TOP 4: Kassenbericht. Bericht der Rechnungsprüfer. Entlastung des Kassierers.

TOP 5: Neuwahlen des Vorstands und zweier Rechnungsprüfer

TOP 6: Festlegung des jährlichen Mitgliedbeitrags

TOP 7: Verhältnis zu der Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI)

TOP 8: Sonstige Aktivitäten und Anträge, soweit bis zur Sitzung eingereicht

TOP 9: Ort und Zeit der nächsten Mitgliederversammlung

TOP 10: Verschiedenes

Herzlich willkommen!

4. KLERIGADO, PLUKLERIGADO

Laŭ komisiono de GEA en Herzberg ankaŭ ĉijare okazadas pluraj trejnkursoj por klerigado kaj pluklerigado, fakseminarioj kaj studsesioj. La unua okazis inter 15-17 februaro. Prelegis Uwe-Joachim Moritz, ĉeftemo: Aspektoj de la problemoj de etnaj minoritatoj en Eŭropo. Koran dankon pro la interesa prelegserio. La tutjara programo de Interkultura Centro Herzberg estas trovebla ĉe <http://ic-herzberg.de>

5. SEKVA STUDSESIO

Inter 4-6 aprilo 2008 okazos la 37a Studsesio en Herzberg.

Ĉefpreleganto: D-ro sc. Detlev Blanke, temo: Interlingvistiko, 2a serio kun la sekvaj temoj:

- Tipologio de planlingvoj kaj la aktuala internacia stato
- Esperanto kiel faklingvo
- Problemoj de tradukado kaj interpretado

Venu – vidu – aŭskultu fakulojn! Kolektu viajn kreditpoentojn por ricevi atestilon.

Tiuj, kiuj ankoraŭ ne partoprenis studsesion en Herzberg - la Esperanto-urbo povas kontakti nin. Se vi havas demandojn rilate al tranoktado ni peros favorprezajn eblecojn!

Detaloj pri la klerigesioj kaj reta aliĝilo estas ankaŭ sur nia hejmpaĝo: <http://ic-herzberg.de>

Pri la kotizoj:

- 1) gejunuloj sub 27 jaroj partoprenas senkotize
- 2) membroj de GEA pagas nur 45,00 €, 3) membroj de EGS nur 30,00 €, 4) nemembroj pagas 60,00

6. LERNEJA INSTRUADO

Ĉiam estas ĝojige ricevi informojn pri novaj lernejaj grupoj. Ekde februaro 2008 komenciĝis esperanto-instruado en la 3a kaj 4a klasoj de kelkaj elementaj lernejoj. Ni atendas pluajn detalojn pri la enhavo de instruado kaj pri la metodoj uzataj. Ni jam nun invitas la instruistojn de lernejaj esperanto-klasoj al la Tutlanda Oktobra Renkontiĝo Pedagogia (TORPEDO-4) inter 02-05.10.2008 por prezenti la rezultojn kaj havi spertinterŝanĝon. Bonvenon!

7. POPOLALTLERNEJO (KVHS)-

Gratulojn al la Munkena Esperanto-Klubo, kiu sukcese organizis intensan semajnfinan KVHS-kurson (8-10.02.2008). ARD televidkanalo prezentis la 17an de februaro 4-minutan filmeton pri la historio de Esperanto kaj fragmentojn el la lingvokurso gvidata de Zsafia Korody en München.

Mi havas kolekton de alvokoj, kiuj aperis en diversaj KVHS-programkajeroj. Tie estas bona, senpaga varbeblo por Esperanto-kursoj. Laŭ peto mi volonte sendas al vi kopion, eble ankaŭ vi ĉerpas ideojn el tiuj tekstoj.

8. SUB-18

Laŭ nova iniciato de GEJ ĉi-jare inter 28-30 marto okazos en Göttingen la kunveno de gejunuloj malpli ol 18-jaraj. Dankon al GEJ kaj la organizanto: Leo Sakaguchi, Am Kreuzberg 5, 63776 Mömbris, 06029/6186, Jampgade@web.de

Estus dezirinde pli frue anonci daton kaj lokon por la sekva jaro. Ni ŝatus pli vaste varbi inter la gekolegoj kiuj instruas Esperanton en lernejoj kaj instigi ilin partopreni kun siaj gelernantoj.

9. TORPEDO-4

Inter 02-05.10.2008 okazos en Herzberg la jam tradicia renkontiĝo de kursgvidantoj, instruantoj, instruistoj. El la ĉi-jara programo:

- trarigardo de lernmaterialoj kun rekomendoj por instruado en diversaj kursoj laŭ celo, nivelo, aĝgrupo, ktp. Ellaboro de kriterioj kaj difino de niveloj laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro. La laborgrupon gvidos d-ro Rudolf Fischer.

- 1a FAKKUNVENO de CSEH-INSTRUISTOJ: teorio kaj praktiko de instruado per rekta metodo, spertinterŝanĝo, trejnado, praktika instrulaboro en Herzberg – la Esperanto-urbo. Venu kaj montru en natura medio, kiel instrui komencantojn!

Viajn prelegtemojn, ofertojn por kontribuado bv. sendi al mi: zsafia.korody@esperanto.de

10. LERNMATERIALOJ

Aperis nova lernolibro en la serio de Esperanto per rekta metodo: Internacia ilustrita lernolibro de Stano Marcek. La lernolibro, kiu aperis jam en kelkdek lingvoj, nun haveblas ankaŭ kun germanlingvaj gramatikaj klarigoj, ekzercoj. Estas mendebla de UEA-libroservo aŭ de la Esperanto-Centro en Herzberg (esperanto-zentrum@web.de, 37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 6.

D-ro Rudolf Fischer prilaboras sian kurson Esperanto en dialogo. Ĝi estas videbla (kaj elshutebla) per la reto <http://www.esperanto.de/lehrbuch>. En la unuaj kvin lecionoj oni lernas la tutan gramatikon de Esperanto.

11. JUNA AMIKO

estas interesa revuo por komencantoj, lernantoj de Esperanto. Ĝi enhavas multajn facilajn legaĵojn, rakontojn, ŝercojn, enigmojn, poemetojn, ktp., bone utiligeblajn helpmaterialojn kaj por lernemuloj kaj por instruantoj.

Juna amiko: Abonprezoj por 2008 restas samaj.

14 EUR por tri 52-paĝaj numeroj, aŭ po 11 EUR por mendoj de tri aŭ pli da ekzempleroj sendendaj al unu adreso.

Perantoj:

- Interkultura Centro Herzberg, 37412 Herzberg, Grubenhagenstr. 6, esperanto-zentrum@web.de
- Esperanto-Buchversand, Dr. Wolfgang Schwanzer, 55129 Mainz, Pfarrer-Seeger-Str.9 wolfgang.schwanzner@tiscalinet.de
- Louis F. v. Wunsch-Rolshoven, 10551 Berlin, Wiciefstrasse 9, lu@esperantoland.org

12. ILEI-NOVAĴOJ

EKZAMENO

Kvin gejunuloj ekzameniĝis dum IS-2007 en Würzburg. Gratulojn kaj pluajn sukcesojn per Esperanto. La sekva ebleco trapasi internacian ekzamenon estos dum UK en Rotterdam (19-26 julio 2008).

ILEI-KUNLABORO

La Interlingvistikaj Studoj de UAM kaj ILEI decidis kunlabori en la formado de esperanto-instruistoj, kiu delonge atendis solvon. La kontrakton inter la du institucioj nun subskribis Zsafia Korody, vicprezidanto de ILEI, la gvidanto de la Studoj, d-ino Ilona Koutny kaj la dekanino de la Novfilologia Fakultato de UAM, prof. Józef Darski.

ILEI-KONFERENCO

En 2008: la 41a konferenco okazos en Porto Novo (Benino, Afriko) inter 29.julio-05 aŭgusto, ĉeftemo: Instruistoj de Esperanto por la Planedo Tero. Aliĝilon, informilon vi trovas en la novembra numero de IPR: (2007/4) kaj sur la hejmpaĝo de ILEI <http://ilei.info>

13. DIDACTA-2008

AGEI reprezentis sin en Stuttgart en la granda foiro pri edukado, instruado inter 19-23.02.2008. Dankon al Alois Eder kaj lokaj organizantoj, helpantoj pro la sindona laboro, deĵoro. Estas bone montri nin en faka, neesperantista medio.

14. URĜA ALVOKO:

Instruisto serĉata

Kristjan Schmidt meph_667@yahoo.de skribis:

wir (der was bewegen e.V. aus Aschersleben/Magdeburg und ich) sind dabei ein jugendtreffen für anfänger aus deutschland, tschechien und polen zu organisieren und benötigen mindestens einen lehrer der die direkte methode gut beherrscht. stattfinden soll das treffen vom 9. bis 15. juni in Zittau (oder in der nähe). ist jemand, der in diesem zeitraum zeit (und lust) hätte einen kurs zu führen? derjenige soll natürlich auch für seinen aufwand entlohnt werden (in welchem ausmaß, kann ich noch nicht sagen, da noch kein finanzplan steht).

Dezirante belan printempon, agrablan Pasko-feston,
kun multaj salutoj

Zsafia Korody